

VESPERTO



LITERATURA FOLIO

Numero:215 .
Aprilo 2010. 18-a jarkolekto

Redaktanto:

Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto
Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Verda stelo

Mi ne ŝatas la insignojn. Por mi la insignoj ofte estas ridindaj. Multaj homoj portas tiujn diversajn sur sia brusto. Infanaĝe la kolektado de la insignoj estis modo. Ni kiel lernejoj kolektis ilin. Mi konfesas, ankaŭ tiutempe ĉi kolektado ne tro interesis min.

Eble tial mi neniam dekoraciis min per verda stelo aŭ aliaj.

Ĉu tio estas bona aŭ ne? Mi ne scias. Ĉies propra decido kio estas metita surbrusten.

Iam vojaĝante al Esperanto Tendaro Lanĉovo, mi devis pasigi nokton en stacidomo. En la atendejo krom mi estis nur junulo. Ni kuŝis sur la malkomforta benko atendante la matenan trajnon.

La nokto pasis tre malrapide. Mia kunulo dolĉe dormis. Mi ne konis lin.

Jam mateniĝis, kiam li vekigis. Li dormeme jetis rigardon al mi. En la megafono ekaŭdiĝis la atentigo pri la alvenonta trajno. Ni ambaŭ ekiris al la perono. Hazarde ni veturis en la sama vagono kaj tute hazarde ni descendis ĉe la sama haltejo, kaj ni ekiris en la saman direkton. Ni venis el la sama lando. Ni estis samlandanaj esperantistoj. Se ni havus etan verdan steleton sur nia brusto, tiam jam nokte povintus interamikiĝi, sed ni hontis dekoracii nin per la insigno de esperantistoj.

Bedaŭrinde!

-Redaktanto-



Hundolingvo

La katoj sidis sub granda arbo kaj ili diskutis pri universala bestolingvo.

Kiu lingvo estu elektita por la ĉiutaga komunikado. Kiom da bestoj, tiom da lingvoj.

Ĉiu besto deziris elekti sian propran lingvon, ĉar ili estis konvinkitaj, ke tiu ĉi lingvo estas la plej taŭga.

Antaŭ nelonge disvastiĝis la novaĵo, ke la bestoj elektis la lingvon de la hundoj. Vere neniu komprenis, kial ĝuste la hundolingvon.

Tio ne plaĉis al la katoj kaj inter ili erupciis grandega diskuto. Preskaŭ ĉiu kato estis kontraŭ la hundolingvo.

-Ni katoj ne akceptas tiun ĉi lingvaĉon. Ni ne deziras lerni ĝin. For la hundolingvon! - kriegadis la katoj, kaj ili eklevis siajn akrajn ungegojn. - Ni elgratos la okulojn de la hundoj. La hundolingvo ne servas la intereson de la katoj.

Ĉiu kato estis kolerema kaj ili deziris manifesti sian neplaĉon.

-Ni deziras indiferentan universalan bestolingvon. La katoj de l' mondo unuiĝu kaj ni malhelpu la akcepton de la hundolingvo.

Ĉiuj katoj laŭte miaŭis, protestis kaj protestis.

Por ili estis ofenda la nova lingvo kaj ĉiu sciis, la katoj neniam akceptos ĝin.

Do, tiel la universala lingvo de la bestoj ne estis solvita, malgraŭ tio, ke la hundoj tre deziris.


-Ŝaŝa-

Poezio

Birdeto
de ADOKOU Folly
Planido
aperis en *OVO*, n-ro 32

Birdeto, kiu al mi kantas la
amon de naskiĝlando,
Vin mi neniam malposedu.
Bonfarajn grenojn mi elektos por via
manĝo.
Birdeto, kiu amuzas min ĉiutage,
Min vi instruas pri bela muziko de l'
koro.
Ĉiuj vortoj, kiujn vi eldiras, lernigas
ion al mi.
Vin mi tre amas.
Kun vi mi ĉiam estos.
Neniam forlasu min.
Sen vi mia vivo estos sensignifa

HUMURO



Okazos baldaŭe
veterŝanĝo, ĉar miaj ostoj
dolorigas min.

Arbaro

(dua ĉapitro)

Apenaŭ mi atendis la matenon, kiam mi deziris reiri al la arbaro por serĉi la rokon.

Mi rememoris en kiun direkton ni ekiris, sed kiel irante al la arbaro la pejzaĝo ŝanĝiĝis. Mi tute embarasiĝis.

Neoble ke mi mistrafu la vojon. Ja, hieraŭ ni iris en tiun ĉi direkton. Krome alia arbaro ne ekzistas en nia ĉirkaŭaĵo.

Mi ekhaltis. Sur la loko de la arbaro mi trovis ebenaĵon kun floraj kampoj.

Ĉu mi stultiĝis? - fulmis tra mia cerbo la penso.

Kio okazis? Kien malaperis la arbaro? Nenie mi vidas ĝin. Hieraŭ ankoraŭ ĝi estis tie ĉi.

Mi longe vagadis sur la flora kampo serĉante la arbaron kun la grotto.

Al kiu mi turnu min por peti helpon. Certe la vilaĝanoj priridus min pro mia demando.

Sed ĉiu scias, hieraŭ ankoraŭ tie ĉi staris arbaro. Ĉiu akiris lignohejtaĵon el tiu ĉi arbaro.

Mi eksidis sur la kampon kaj mute mi rigardis la bluan ĉielon, kie birdeto flugis.

Vane mi revos tie ĉi ĝis vespero, la arbaro ne reaperos.

Eble mi nur songis la hieraŭan aventuron. Mi ne estis en tiu arbaro, tiu arbaro neniam ekzistis.

Post iom da tempo mi ekiris hejmen malgaje.

Dumvoje mi ankoraŭfoje rememoris pri la renkontiĝo kun la fremdulo. Nenio stranga estis en mia memoro. Vere por mi estis nekutima, ke mi tuj sekvis tiun homon.

Hejmenalveninte antaŭ ol eniri la domon de sur la verando mi ririgardis al la direkto de la iama arbaro.

Liaj piedoj ŝtoniĝis pro la vidaĵo. En la foro klare vidiĝis la nebulaj konturoj de la arbaro.

La arbaro denove estis vidata, kiel antaŭe.

Ĉu mi freneziĝis? - mi demandis de mi, sed kompreneble mi ne ricevis respondon.

Li timis rakonti sian aventuron ankoraŭ al kiu ajn. Verŝajne neniu kredus min.

Ankoraŭfoje mi devos reiri al la arbaro. Eble nun sukcesos.

Mi ne hezitis longe, kaj mi reiris. Mi tre esperis, ke la roko estos trovita kaj mi riĉiĝos.

Tiu ĉi penso donis esperon al mi

Nun la arbaro estis trovita. Certe antaŭe nur la imago ludis per mi aŭ ia stranga iluzio trompis min.

Mi aplombe iris sur la mallarĝa arbara vojeto kaj dume mi zumkantis gaje, ĉar mi ege esperis, baldaŭe mi trovos la trezoron.

Mi ne scias kiom longe mi vagadis en la arbaro. Vane estis konata ĉiu arbo kaj arbusto, mi ne trovis la rokon.

Mi sentis, ke mi freneziĝos.

Kie estas la roko? - Mi demandadis de mi. - Mi nepre devos trovi ĝin.

Fine jam mi malesperiĝis kaj preskaŭ mi ekploris netrovante la rokon.

Mi certe sciis, ke ĝi staris tie ĉi proksime al tiu olda kverko. La arbo estis trovita, nur la roko mankis.

Ekde tiu ĉi tago tage kaj nokte mi deziris iri al la arbaro. Tion rimarkis ankaŭ miaj konatuloj kaj laŭ mi ili alvokis kuraciston, kiu tuj sendis min al nervosanatorio por kuraci mian malsanan cerbon.

Nun mi estas fermita en grandan, blankan ĉambron kaj mi sidas meze de la ejo. Mi cerbumas, kiel trovi tiun multege da trezoro, kiu kuŝiĝas sub la roko. Se la sinjoro doktoro alvenos mi konvinkos lin, ke ni kune serĉu la trezoron. Li estas bona kaj simpatia viro, tial certe akceptos mian proponon.

Ho, jam mi aŭdas liajn pezajn paŝojn. Do, mi petos lin. Ankoraŭ kelke da sekundoj kaj mi estos libera.

-Bonan tagon sinjoro doktoro! Mi jam atendis vin.

-Ĉu vere? - demandis la kuracisto - Per kio mi povas servi al vi.?

-Sinjoro doktoro, lasu min iri al la arbaro! Mi donos al vi la duonon de la trezoro. Mi certe scias, ke tie sub la roko estas trezoro. El ĝi vi povos konstrui propran nervosanatorion. Vi estos ege, ege riĉa.

-Jes, kompreneble kara. Ni nepre serĉos tiun trezoron kune. Sed nun mi estas tro okupita. Mi devas iri al la alia malsanulĉambro, kie kuŝas viro, kiu senĉese diradas: Mi malkaŝis la sekreton de mia trezoro al junulo kaj li ŝtelos ĝin. Ankaŭ li volas iri al la arbaro. Se li resaniĝos, tiam ni triope vizitos tiun arbaron. Ĉu bone?

La kuracisto ne atendis mian respondon ridetante forlasis la ĉambron.

(Fino)

-Apáti Kovács Béla-

Por infanoj

La pigra birdo

Iam vivis birdofamilio en belega nesto sur la pinto de alta arbo. La birdopaĉjo kaj patrino havis malbonan fileton, kiu estis tre maldiligenta.

Dum la tuta tago li faris nenion. Liaj gepatroj vane instigis lin por ke li laboru, kiel la aliaj birdoj. Li nur ridetis kaj li plu sidadis sur arbobranĉo.

Proksime al la arbaro vivis sovaĝkato, kaj li jam delonge sopiris manĝi birdon. Sed ĝenerale la birdoj estas atentemaj, kaj ilin kapti estas tre malfacila. Unue la kato devas suprengrimpi la arbon, sed la birdoj ĉiam rimarkas la fiulon kaj ĝustatempe ili povas rifuĝi.

La sovaĝkato malrapide proksimiĝis al la nesto. La birdoj tuj rimarkis ĝin. Ili atentigis unu la alian. La pigran birdon ne interesis ilia averto. Ĝi plu dormetis en sia nesto.

-Fuĝu! La kato baldaŭ atingos vin - petegis al ĝi la aliaj.

Ĝi dormeme malfermis siajn okulojn, sed poste ĝi denove ekdormis.

La birdo estis pigra por rifuĝi. Ĝi restis senmove en la nesto.

Ankoraŭ unu eta salto kaj la kato kaptos ĝin.

Ĉiuj birdoj rigardis la okazantaĵojn kaj jam ili vidis, kiel la kato ekkaptos la malfeliĉan birdon, kiu je la bruo malfermis siajn okulojn. Nun jam ankaŭ ĝi timegis, sed ne estis tempo savi la vivon.

Dank' al la sorto la sovaĝkato maltrafis la salton kaj la maldika branĉeto rompiĝis. La kato terenfalas kaj tiel la pigra birdo saviĝis. Hodiaŭ el ĝi ne fariĝis vespermanĝo.

Tio estis bonega instruo por la birdo kaj tiam ĝi decidis, ke en la estonto ĝi ne estos pigra, ĉiam akceptos la konsilon de siaj familianoj.

-Onklo Adalberto-

